LA VERDA LUPEO

Aprilo 2016 *(48a jaro)* *N-ro 171*

Esperanto Ligo Filatelista / Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Redakcio: Rudolf Burmeister Max-Müller-Str. 86 DE 09123 CHEMNITZ

2012 Sapporo - La 99a Japana Esperanto-Kongreso
Kongresa poŝtkarto, E-poŝtstampo kaj E-poŝtmarko



Jen kalendareto 2016, eldonita en Francio.

Temas pri "faldkalendareto" kun gramatiko sur reverso.

Tiaj Esperantaĵoj tutcerte troveblas abunde en la tirkestoj de niaj klubaj geamikoj.

Rolf Beau komencis registri tiujn aperintajn en GDR. En mia urbo ekzistis respublikfama filatelejo, kiu ĉiujare ekde 1966 eldonis tiajn kalendaretojn (ankaŭ alumet-kajeretojn) kun la slogano: "La mondo malfermiĝas al la filatelisto pere de Esperanto".



L'espéranto ? ... la langue équitable !

UNE GRAMMAIRE FACILE

Les noms se terminent par o
Les adjectifs se terminent par a
Les adverbes se terminent par e
La terminaison j est la marque du pluriel
La terminaison n est la marque du complément

UNE CONJUGAISON LOGIQUE

iri : aller

mi iras	: je vais	ni iris	→ passé
vi iras	: tu vas	vi iros	→ futur
li/ŝi iras	: il/elle va	ili irus	→ conditionnel

DES SUFFIXES INNOVANTS

	métier	féminin	groupe
ŝafo mouton	ŝafisto berger	ŝafino brebis	ŝafaro troupeau
kanto chant	kantisto chanteur	kantistino chanteuse	kantaro répertoire

UNE PRONONCIATION CLAIRE

comme en français, sauf :

c → ts ĉ → tch j → y ĵ → j
ĝ → dj ŝ → ch u → ou ŭ → w

UNE PRATIQUE IMMÉDIATE

Bonan tagon. Kioma horo estas?
Bonjour. Quelle heure est-il ?

Saluton! Estas la deka horo kaj dudek.
Salut ! Il est dix heures vingt.

Dankon. Kiujn lingvojn vi lernas?
Merci. Quelles langues apprenez-vous ?

Mi lernas la italan kaj la germanan lingvojn.
J'apprends l'italien et l'allemand.

Mi vivas en Francio. Mia nomo estas Maria.
Je vis en France. Mon nom est Maria.

Estas agrable aŭskulti la radion Muzaiko.
C'est agréable d'écouter la radio Muzaiko.

Jes. Ĝis revido!
Oui. Au revoir !

L'espéranto est une langue indépendante et accessible à tous qui favorise la diversité linguistique.

www.esperanto-france.org/apprendre

Espéranto-Jeunes & Espéranto-France
4 bis, rue de la Cerisaie 75004 Paris tél. 01 42 786 886

Faldkalendareto 2010

Eldonita de
Itala Esperanto Federacio

kun dorsflanka mini-gramatiko

COS'È L'ESPERANTO?
L'esperanto è una lingua creata 120 anni fa per unire tutti i popoli del mondo affinché sia possibile comunicare senza barriere.

FONETICA
Tutte le parole sono piane: revído, komprénas...
Ogni lettera corrisponde ad un solo suono e per ogni suono c'è una ed una sola lettera.

LE TERMINAZIONI
-A : aggettivi
-O : nomi
-J : plurale
-N : complemento oggetto
-E : avverbi

PER I VERBI...
-I : infinito
-AS : presente
-IS : passato
-OS : futuro
-US : condizionale
-U : imperativo

I NUMERI

1	unu	7	sep	20	dudek
2	du	8	ok	30	tridek
3	tri	9	naŭ	100	cent
4	kvar	10	dek	200	ducent
5	kvin	11	dek unu	1000	mil
6	ses	12	dek du	2010	dumil dek

AGGIUNGENDO...
MAL-: si ottiene il significato opposto della parola
es. *bela* [bella/o] *MALbela* [brutta/o]
-ET- : si ottiene il diminutivo, il vezzeggiativo
es. *bela* [bella/o] *belETa* [carina/o]
-EG- : si ottiene il superlativo assoluto
es. *bela* [bella/o] *belEGa* [bellissima/o]
-IN- : si ottiene il femminile
es. *frato* [fratello] *fratINo* [sorella]

LESSICO
Saluton = ciao
Bonan tagon = buon giorno
Ĝis la revido = arrivederci
Mia nomo estas ... = il mio nome è ...
Kiel vi fartas? = come stai?
Mi fartas bone, dankon = sto bene, grazie
Kion vi faras? = cosa fai?
Mi ludas = io gioco
Mi ne komprenas = non capisco
Kiom kostas? = quanto costa?

5x 1000
Aiutaci ad aiutare l'esperanto
Destina anche tu il 5x1000 alla Federazione Esperantista Italiana,
Cod. Fisc. 80095770014

Kalendaretoj el GDR



Kalendareto el PR Ĉinio, 1987
Eldonis: Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio
Guoji Shudian
Esperanta Sekcio, Pekino



Eltondaĵo de poŝte sendita koverto

Poŝta E-stampo el Serbio

„Centjara Jubileo de Esperanto en Senta“ (1915 - 2015)

19 06 2015 en Senta, Serbio
ronda, 32 mm

Bildo : vidu apude

Iniciatis: E-Societo de Senta

En nia LVL 169 ni jam montris
la memor-poŝtkarton
eldonitan okaze de la
„25-a Verdaj Amikaj Tagoj“ en Senta.

Videblas sur ĝi la memortabulo
por la „Arbo de Amikeco“,
plantita en la jaro 1997.

S-ano Imre Belec sendis la materialon.

Koran dankon al li.

Kongresa bildkarto kun la poŝta stampo

82a Itala E – Kongreso

Loko: San Benedetto Del Tronto
(Sanbenedeto ĉe rivero Tronto)
Dato: 22. 8. 2015
15-20 h en poŝta giĉeto
sur placo Giorgini
Mezuro: Ovala, 37x31 mm
Bildo: Urba blazono
Teksto: 82a ITALA KONGRESO
81a INTERNACIA KONGRESO
DE BLINDAJ ESPERANTISTOJ
(kaj en la itala lingvo)

La stampon desegnis nia kluba amiko Giovanni Zanaboni, sekretario de la LKK. Ekskurso celis i. a. al la farmbieno "Ĉu Ĉu" en Offida. Tie la vit-kultivistoj produktas apud aliaj vinoj ankaŭ "Esperantaĵon", nome la ruĝan vinon ESPERANTO. Apude la vinbotela etikedo.
Vidu en reto: [Vini Rossi | Azienda Vitivinicola Ciù Ciù]

Kelkaj stampitaj kartoj haveblas ĉe nia prezidantino.
Unu ekzemplero kostas 2.50 € + sendokostoj.

Strangaĵo ĉe kroata E-pm, emisiita 21.07.2001 okaze de la 86a UK

Apud ĉiuj marĝenaj, foliorandaj, poŝtmarkoj videblas spuroj de la orig. poŝtmarko. Tamen ne temas pri talonoj...



PONTO ★
Jaro 15 N-ro 1 (68) Organo de Sunda Esperanto Agado januaro 2016

25.11 Brazila vizito.
Vizitis nin brazila esperantisto, nome James Rezende Piton, laboranto en sinkrotrona laboratorio. Dum teknika vizito al la sveda sinkrotrono en Lund li kaptis la okazon viziti ankaŭ nin.
James prelegis pri sia kolekto de bildkartoj, kiuj kovris vastan temaron - reklami klubojn, varbi por aranĝoj, prezenti individuojn kaj utilis por plej nepenseblaj celoj, kiel instruiloj de gramatiko aŭ konteltiroj de UEA.
Esperantohistorio per bildkartoj estis tre populara komunikilo inter pioniraj esperantistoj komence de la 20-a jarcento.

Interesa estis ankaŭ lia kolekto de multaj helplingvoj kiuj estis por ni tute nekonataj.
La tre interesan viziton partoprenis gastoj el Malmö, Lund, Helsingborg kaj Kopenhago.

Gertrud Lund

Nia kolego James Rezende PITON en novembro 2015 vojaĝis tra Eŭropo kaj vizitis la E-klubojn en Trieste kaj Malmö. Tie li prezentis lumbildprelegojn pri E-bildkartoj. La lokaj klubaj E-informiloj raportis pri tio.
Supre la raporto de la informilo PONTO, januaro 2016.
SUNDO estas la nomo de la parto de Balta Maro inter Danlando kaj Svedujo.
Ponto trans la Sundo ligas la danlandan Kopenhago kun la sveda Malmö.
Ĝuis tiun ponton nia Piton gaste en aŭto de sveda Esperantisto.

Hiroŝima Esperantista Klubo 1911
Bildkarto en la Piton-kolekto

Nia kluba amiko James Rezende Piton (maldekstre)
en la E-klubo de Malmö (nov. 2015)
Foto el PONTO, jan. 2016

Ni kore dankas al nia James Rezende Piton!

http://kolektado.esperanto.cc/

Anstataŭ danci sambon dum la brazila karnavalo nia kolego James faris novan retejon pri nia klubo.

Li planis kaj realigis la jenajn erojn en la ĉefmenuo de la retejo:

1) Pri E-kolektado en ĝiaj diversaj branĉoj, kun ĝeneralaj tekstoj por priskribi ĉiujn objektojn de kolekto

2) Virtuala metiejo
(kun artikoloj kiuj orientigas novkolektantojn pri praktikaĵoj)

3) Kolektoj
Ni invitas niajn membrojn sendi priskribon, fotojn, paĝojn por ilustri iliajn kolektojn, ricevitajn medalojn, ktp.

4) Kolektindaĵoj
(juveloj de la kolektoj, ekz. fotoj de kongresaj insignoj, elstaraj poŝthistoriaj filatelaĵoj ktp.)

5) Foto-Galerio (membro-kunvenoj, klubamikoj en ekspozicioj …)

6) La Verda Lupeo
(listigo de kelkaj eroj de nova numero)

Jam nun eblas rigardi dosierojn pri kolektoj de Piton, Bartoŝik-filo kaj tiun de *eventoj, HU*. En ĝi vi renkontas 2100 E-bildkartojn, kaj al tiu paĝo vi povas aldoni viajn posedaĵojn, kopie, por kompletigo.

En ĉi-tiu LVL ni montras vicon da japanaj bildkartoj, kiujn vi ne renkontas ĉe la hungaroj. En la sekvonta LVL, en Aŭgusto, ni aldonos duan parton.

E-bildkartoj en Japanio

Vizitinte la retpaĝaron de "eventoj.hu" pri E-bildkartoj, mi rimarkis, ke por Japanio mankas multaj E-bildkartoj. Tial ĉi-loke ni montras la al ni konatajn. Eble iuj mankas, kaj se vi konas aliajn, sciigu pri ili.

La 90a Japana Esperanto-Kongreso
en Kameoka, 2003

La 92a Japana Esperanto-Kongreso
en Jokohama, 2005

2007 Kunveno de Goo-ludantoj en la 92a UK en Jokohamo

2007 La 92a UK en Jokohamo

2007 La 92a UK en Jokohamo
(Bildflanko de la suba)

2007 La 92a UK en Jokohamo
(Adresflanko)

2010 La 58a kongreso de Esperantistoj de Kansajo en Nara
(dorse kun surpresita prikongresa teksto)

2010 La 97a Japana Esperanto-Kongreso en Nagasaki
(dorse kun surpresita E-teksto)

2012 La 99a Japana Esperanto-Kongreso en Sapporo

Maldekstre en la karto videblas kopie la unua E-stampo de Japanio



2012 La Esperanto-Domo en Yatugatake
de Japana Esperanto-Instituto



2013 La **61a Kongreso de Esperantistoj**
en Kansajo - Wakayama

2014 La 62a Kongreso de Esperantistoj
en Kansajo - Himeji

2013 La 100a Japana Esperanto-Kongreso en Tokio

2014 La 101a Japana Esperanto-kongreso en Obama

2015 La 102a Japana Esperanto-Kongreso en Sendai

40a Japana E-kongreso en Okajama 1953

41a Japana E-kongreso en Tokio 1954

44a Jap. EK en Nagoja 1957

Pk-tutaĵo de Jap. E-instituto 2014



45a Jap. EK en Kumamoto 1958

42a Jap. EK en Osaka

63a Jap. EK en Seto



Ŝajne temas pri poŝte eldonita memorfolio kun surpresaĵoj pri la 87a Japana Esperanto Kongreso okazinta en Kumamoto en la jaro 2000. Tion supozigas la suba noto KUMAMOTO CENTRAL POST OFFICE.

En la japana kaj en Esperanto troveblas:
La 87a Japana Esperanto-Kongreso 2000 10 13-15
La poŝtmarkoj estas nuligitaj per la E-stampo kaj „pejzaĝa“ poŝtstampo.
Krome videblas en la suba parto en la japana kaj Esperanto la kongresa devizo:
Arde, amuze al la nova epoko!

La folio havas mezuron de 20x23 cm.
La randon ĉirkaŭas en multkoloraj literoj la teksto: MEMORIAL STAMP ALBUM

Filatela ekspo kaj E-pm kun E-stampoj en la UK Nitra
Letero de Peter Holba, LKK-ano de la UK

101-a Universala Kongreso de
ESPERANTO
23.-30.07.2016 Nitro, Slovakio

Mi skribas al vi nome de la LKK, kaj mi volas vin informi pri filatela aktivado dum la UK en Nitro, Slovakio. En kunlaboro kun la Slovaka filatela asocio sukcesis al ni atingi, ke okaze de la UK estu eldonita oficiala poŝtmarko kun FDC, kiun ni inaŭguros dum la malfermo de la kongreso. Samtage estos uzata ankaŭ la inaŭgura stampilo. Krom tio, kun la loka filatela grupo, ni organizos propagandekspozicion. Ĝi daŭros de la 25a ĝis la 29a de julio 2016. Dum la ekspozicio funkcios ankaŭ speciala okaz-stampilo. Ni planas, ke la esperantistoj, kiuj partoprenos kun siaj eksponaĵoj alportos ilin je la alveno la 23an de julio ĉe la akceptejo. La malfermo de la ekspozicio estos la 25an de julio, posttagmeze, dum la fermo la 29an, tagmeze. Poste ĉiuj povos preni siajn materialojn reen.

Per tiu ĉi ekspozicio ni volas ne nur propagandi esperanton en nia lando sed ankaŭ propagandi reciproke nian landon. Tial mi ege petas vin propagandi la ekspozicion inter viaj membroj, (eble ankaŭ en via gazeto), espere ke ni montros, ke esperanto estas vere tutmonde uzata. *Sincere via Peter Holba*

Aliĝilo por la ekspozicio

Nomo kaj antaŭnomo de ekspozicianto:
adreso:
retpoŝto:
nomo de eksponaĵo:
nombro de paĝoj (marku: 16, 32, 48, 64, 80), originalo aŭ kopio
dato kaj horo de alveno en Nitro:
adreso por sendi aliĝilon: Peter Holba, Hviezdoslavova 8, 93401 Levice, Slovakio
aŭ retadreso: petro.holba@gmail.com

ELF-AREK

Esperanto-Ligo Filatelista
Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Prezidantino:

S-ino Elda Doerfler
Via Ghirlandaio 18/1   IT-34138   TRIESTE

>testudo.ts@gmail.com<

Jen mia bankokonto:

IBAN IT35 R076 0102 2000 0001 7452 996 – Banco Posta
BIC: BPPIITRRXXX.   Por: Elda Doerfler

UEA-konto: **ELF/AREK = Kodo: elfx/r**

Jarkotizo: € 17.00 - Membroj en socialismaj kaj ekssocialismaj landoj: € 15.00
Se vi ne havas aliron al nia konto ĉe UEA, bonvolu kontakti nian prezidantinon.

Adresŝanĝo:

James Rezende Piton
R. Aristides Perini, 48   - Cond. Okinawa –
PAULINIA - SP, 13141-900, BRA

GAO Zhenxing
Hefeiliu 288 Hao   Fuling Jiajun * D – 6 Haolou
3 Danyuan 101
266035 QINGDAO P R CHINA
Kolektas: E-filatelaĵojn (kovertoj. kartoj stampoj),
kaj de IDO, Interlingua, Volapuko kaj aliaj planlingvoj.
Retadreso: cosinc@foxmail.com